Heinrich Heine,

# Mi sonĝis

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En sonĝo princinon vidis mi
Kun vangoj malsekaj de ploro, -
Sub arbo, sub verda jen sidis ni,
Tenante nin koro ĉe koro.

"De via patro la reĝa kron',
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for la sceptro kaj ankaŭ la tron' -
Vin mem mi deziras, aminda!"

- "Ne eblas tio!" respondis ŝi:
"En tombo mi estas tenata,
Ja nur en la nokto venas mi
Al vi, mia sole amata!"

*Traduko de la Germana poemo "Mir träumte" de* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

*Arg-526-1042 (2010-03-12 15:40:27)*

*Mi, Manfred Retzlaff, permesis al mi ŝanĝi kelkajn liniojn de tiu Esperantigo, kiun verkis Ludoviko Zamenhofo; ĉar en la origina versio de Zamenhofo la finaj vortoj de la unuaj kaj triaj linioj estas dusilaboj, dum en la origina versio de H. Heine tiuj estas uunsilabaj, tiel ke la akcento estas sur la lasta silabo de tiuj linioj. Krome, en du linioj mankas en la Zamenhofa origina versio kvara akcentita silabo. Tion mi provis "plibonigi". (Mi supozas, ke s-ano Zamenhof pardonus tion al mi.)*

Heinrich Heine,

# Mir träumte

Mir träumte von einem Königskind,
Mit nassen, blassen Wangen;
Wir saßen unter der grünen Lind'
Und hielten uns liebumfangen.

"Ich will nicht deines Vaters Thron,
Ich will nicht sein Szepter aus Golde,
Ich will nicht seine demantene Kron',
Ich will dich selber, du Holde!"

"Das kann nicht sein", sprach sie zu mir,
"Ich liege ja im Grabe,
Und nur des Nachts komm' ich zu dir,
Weil ich so lieb dich habe."

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-526-1040 (2010-03-12 14:06:36)*

*Aus dem Gedichtband "Buch der Lieder", Lyrisches Intermezzo, Gedichte I.*